Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 3 Marto, 2016

*Kara Leganto, pasis nur unu kalendara monato de nia la plej lasta februara eldono. Ĉu io ŝanĝiĝis? Sendube – jes: printempo deprenas siajn naturajn rajtojn de vintro (kiu, fakte, estis sufiĉe tolerebla dum la lastaj tri monatoj). Nature kaj ekonomie ni bonstatas, kion oni ne povas diri pri la politiko: ekis proprezidenta kun-kurado: neniu povas prognozi, ĉu venkos malobeema prezidinta edzino aŭ ŝia malrivalo, preskaŭ demokrato. Respublika partio en Usono preskaŭ mortis. Sed…*

*Sed malgraŭ ĉio E-movado en la glora urbo Ŝikago prosperas, pri kio signifas religi-filozofiaj prelegoj de la lastaj du monatoj. Aktiviĝis ankaŭ E-movado en la eksaj pro-moskvaj satelitoj: Blankrusio kaj Ukrainio. Vin kore invitas la sekvanta E-kongreso de Esperanto-USA. Preskaŭ milo da E-istoj aliĝis al la UK en Nitvo (Slovakio), Legu artikolojn malsupre. Ĝis la!*

–La Redaktoro


# Mallonga Historio de la Luterana Movado

de Hanso BECKLIN



En la frua deksesa jarcento, en germana urbo Vitenbergo loĝis monaĥo kaj profesoro Martino LUTERO. Tie li instruis teologion ĉe la urba universitato. Li dubiĝis pri la teologio de la samtempa eklezio. Tiam, la Roma Eklezio instruis la ideon, ke nur Papo rajtas doni gracon de Jesuo al kristanoj, ofte nur kiam kredantoj pagis monon al la eklezio en Romo por kovri siajn pekojn. Tiu instruo gravis, ĉar la eklezio ankaŭ instruis, ke kristanoj, mortintaj sen sufiĉo da graco estu en purgatorio. Laŭ la mezepoka roma eklezio, purgatorio estas loko, kie kredantoj suferas pro iliaj pekoj antaŭ ili eniras Paradizon.

Laŭ Lutero, tiu instruo de la eklezio ne estis bazita sur la Biblio. Ĉar Lutero estis edukita, li povis legi la Biblion en la lingvo de la eklezio – la latina. Mezepoke, eĉ edukitaj viroj, kiuj ne estis pastroj aŭ monaĥoj, ne rajtis legi la Biblion. Lutero ekinstruis: "Ĉar per graco vi saviĝis per fido; ne per vi mem: ĝi estas dono de Dio; ne el faroj, por ke neniu fanfaronu" (Efesanoj 2:8-9).




Lutero devis instrui laŭ la Biblio, ne nur laŭ la instruado de la roma eklezio. Do, li instruis, ke ĉiuj devus legi la Biblion kaj lerni el la Vorto de Dio. Li tradukis la tutan Biblion en la germanan. Tamen Lutero pensis, ke la Biblio estas la bazo de la kristana kredo, li ne estis laŭlitera aŭ senmetafora biblileganto. Laŭ Lutero, se parto de la Biblio ne estas plena de la amo kaj graco de Dio, tio ne taŭgas. Pro tiu, Lutero forigis duakanonajn librojn el la protestanta Biblio.


Lutero ne deziris fondi apartan eklezion, li deziris reformi la Roman Eklezion per lia komprenado de la Biblio. Bedaŭrinde, li kaj liaj posteuloj ne ekpovis reformi la eklezion interne. Tamen, la luteranaj reformistoj ne volis ŝangi tiom, do la bazaj kredoj povas ŝajni simile al la nuntempa Roma Eklezio.

La luterana eklezio jesas la prakredkonfesojn de la tuta eklezio kaj la triunuan Dion. Laŭ luteranoj, Jesuo starigis nur du sakramentojn en la Biblio: la sankta manĝo kaj la bapto. En la mezepoka eklezio, estis sep sakramentoj, do tiu estis granda ŝanĝo.

Luteranoj kredas, ke la sango kaj korpo de Jesuo estas "en, kun kaj sub" la sanktita vino kaj pano. La pastro enigas Jesuon en la panon kaj vinon per la preĝo super la sankta manĝo. Luteranoj pensas, ke sen la graco de Dio, homaro ne povas atingi vivon eternan. Laŭ luterana teologio, la plej certa maniero por ricevi la gracon de Dio estas la bapto, ĉar Jesuo diris en la evangelio laŭ Marko, "kiu kredos kaj estos baptita, tiu estos savita." ☞

Komence, luteranaj eklezioj estis nur en Eŭropo, kie reĝoj kaj princoj postulis lian popolon luteraniĝi. Tiuj landoj estis Svedio, Norvegio, Danio, Finnlando kaj duono de Germanio. Nuntempe, tiuj landoj ankoraŭ havas multe da luteranoj, tamen ties civitanoj ne devas kredi luterane. Kiam tiuj eŭropanoj enmigris aliajn landojn, ili portis luteranismon al tiuj novaj landoj. En la deknaŭa jarcento, luteranaj misiistoj luteranigis ceterajn landojn. Nuntempe, estas pli ol sepdek milionoj da luteranoj tra la mondo.

## Zamenhofa Spirito Revenas al Ĥersono




La 19an de februaro Volodimir Mikolajenko, la urbestro de ukrainia urbo Ĥerson, subskribis dokumenton pri ŝanĝo de 93 nomoj de stratoj, placoj, parkoj k. s. en la urbo kadre de la senkomunismigada nom-kampanjo, realigata en Ukrainio. Pro ĉi tiu decido sur la mapo de Ĥersono aperis strato Ludoviko Zamenhofo (antaŭe ĝi havis la nomon de Dimitr Blagoev, fondinto de la Bulgara Laborista Socialdemokratia Partio). En novembro 1889 la 29-jara L. M. Zamenhof eklaboris en Ĥersono kiel okulkuracisto, sed, ne sukcesinte konkurenci kun sia kolegino, en majo 1890 li forlasis ĉi tiun urbon kaj revenis al Varsovio. Sian restadon en Ĥersono Zamenhof mem jene prezentis en sia fama letero al Alfred Michaux, skribita la 21an de februaro 1905.

## … kaj en Grodnon



En Grodno (Blankrusio) oni eternigis memoron pri Ludviko Zamenhof. Sur la domo, kie loĝis la fondinto de Esperanto dum 4 jaroj (1893-97) kaj kiu aoartenis al lia avo Fabian Zamenhof, estis revenigita memortabulo. Ĝi aperis tie laŭ iniciato de aktivuloj de la Grodno E-societo «Espero» ankoraŭ en la dua duono de la 1980-aj jaroj. Poste, pro kriz-kondiĉo de la konstruaĵo ĝi estis forigita kaj metita en la urbodomon. Lastatempe en renovigita domo de "Doktoro Esperanto" okazis festo: la nuna dom-posedanto – grodna komercisto Nikolaj Ŝamin – rakontis pri siaj estontaj planoj: "Por mi estis grave konservi la historiajn trajtojn de la konstruaĵo, kie vivis kaj laboris Ludoviko Zamenhof, kies nomo estas konata tra la tuta mondo. Ekzistas la ideo iam malfermi tie muzean ĉambron, ĉar por multaj homoj, lernantaj la lingvon, estas interesa personeco de Zamenhof".

## Landa Kongreso, Esperanto-USA

Okazos la 8-11-an de Julio, 2016, en Universitato de Miamio, Miamio, Florido. La kongreso komenciĝos per la Interkona Vespero je vendrede, la 7-an horoptm; kaj finiĝos lunde ja la tagmezo.

**Aliĝo:** esperanto-usa.org/retbutiko/index.php?main_page=index&cPath=1004

**Bankedo:** partopreno ne estas deviga, sed ege rekomendinda! La bankedo estos ĉe la Newman Alumni Center, transportado estos garantiita.

**Loĝado:** estas po unu aŭ du personoj en studenta dormĉambro ĉe la universitato. La plejmulto de kongresanoj tranoktos vendredon, sabaton, kaj dimanĉon (la 8-a, 9-a, kaj 10-a de julio). La kongres-ĉambroj estas en la sama konstruaĵo. Sendrata ret-konekto estas havebla en ĉiu ĉambro.

La strat-adreso de la dormejo estas:
*Mahoney Residential College*
*1101 Stanford Drive*
*Coral Gables, FL 33146*

**Adreso:**

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

**Estraro:**

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn
Membro – Hans Becklin

**MEMBROKOTIZOJ**

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago,
and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

**SEKVANTAJ KUNSIDOJ**

1350 N. Wells St., Ŝikago. Bonvenon! Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro: (773) 344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn (dolĉakvon, bieron, vinon ktp).

**22an de Marto** – Pri moskva bardo Vlad Vysockij rakontas Araneo
……………………
**26an de Junio** – Tradicia E-pikniko

## Esperanto en CNN

www.youtube.com/watch?v=bL5SZQP1k8I